SEPA ORDINARA TEMPO – 20-an de februaro 2011

**AMU VIAJN MALAMIKOJN – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

***Mt 5,38-48***

***En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj:***

***"Vi aŭdis tion, kio estis dirita: ‚Okulon pro okulo, kaj denton pro dento'. Sed Mi diras al vi: Ne kontraŭstaru al malbono. Sed, se iu frapas vian dekstran vangon, turnu al li ankaŭ la alian. Kaj se iu volas procesi kontraŭ vi por forpreni vian tunikon, lasu al li ankaŭ vian mantelon. Kaj se iu devigas vin iri kun li unu mejlon, iru kun li du. Donu al tiu, kiu petas de vi, kaj ne deturnu vin de tiu, kiu deziras prunti de vi.***

***Vi aŭdis, ke estas dirite: ‚Amu vian proksimulon kaj malamu vian malamikon.' Sed Mi diras al vi: Amu viajn malamikojn kaj preĝu por viaj persekutantoj. Tiel vi estos filoj de via Patro, kiu estas en la ĉielo. Ĉar Li igas leviĝi sian sunon super malbonulojn kaj bonulojn kaj sendas pluvon super justulojn kaj maljustulojn. Ĉar, se vi amas nur tiujn, kiuj amas vin, kian meriton vi havas? Ĉu ne ankaŭ la impostistoj faras tion? Kaj se vi salutas nur viajn amikojn, kion rimarkindan vi faras? Ĉu ne ankaŭ la paganoj faras tion? Estu do perfektaj, kiel via ĉiela Patro estas perfekta.***

Povas ŝajni malkuraĝiga la invito kiun Jesuo faras kaj kiun ni legas en la evangelio de Mateo: "Estu perfektaj, kiel via ĉiela Patro estas perfekta", ĉar ni tuj pensas pri la perfekteco de Dio, kun ĉio kion ni imagas, je povo je grandeco de Dio.

Ni vidu male kion celas la evangeliisto per tiu ĉi invito al perfekteco. La evangelio kiun ni komentas estas la ĉapitro 5 de Mateo, ekde la versiklo 38. Jesuo daŭre distanciĝas de la leĝaro de Moseo por prezenti alternativan socion kaj novan manieron por rilati kun la Sinjoro. Kaj diras Jesuo : "*Vi aŭdis tion, kio estis dirita: ‚Okulon pro okulo, kaj denton pro dento".*

Tiu Mosea leĝaro reale estis granda antaŭenpaŝo en tio kio rilatis la mastrumadon de la venĝo kiu estis antaŭe senlima. Famas en la Biblio la fiero de Lemeĥ, kiun ni trovas en la libro de Genezo, ĉapitro 4, versiklo 24, kie Lemeĥ plendas kaj diras: "*Mi mortigis viron pro iu mia skrapvundo kaj knabon pro iu mia bluaĵo".*

La venĝo do estis senlima. Moseo male klopodis meti limon, okulon pro okulo, denton pro dento. Nu Jesuo distanciĝas de tio kaj invitas paŝon antaŭeniri. *"Sed Mi diras al vi: Ne kontraŭstaru al malbono".* Ne signifas tiu invito de Jesuo esti pasivuloj, kiuj akceptas ĉiujn perforton. La kristano ne estas tia, kontraŭe. Sed tio signifas rompi la perfortocirklon, proponi iniciatojn de bono, amo kaj paco, kiuj deprajmu tiun malamon kaj tiun perforton kiuj surverŝiĝas sur vin.

Pro tio kiam Jesuo diras: “*se iu frapas vian dekstran vangon, turnu al li ankaŭ la alian*” tio ne signifas esti konsiderataj stultaj, Jesuo ne petas al ni esti stultaj, malspritaj, sed ĝisfine bonaj. Fakte la unuan fojon en la evangelio de Johano en kiu Jesuo ricevas vangofrapon, li certe ne turnis la alian vangon, sed diris “Se mi eraris montru al mi en kio mi eraris, se mi ne eraris kial tiu perforto?”

Jesuo do invitas ne kontraŭmeti al la perforto kiu falas sur nin alian perforton, alie tiu pligrandiĝas kaj iĝas poste senfina pliintensiĝo de perforto kiu generas plian perforton. Pro tio Jesuo ne petas – mi ripetas - esti stultaj, sed esti bonaj, deprajmigi la perforton per proponoj de eĉ pli granda bono.

La kredanto estas tiu kiu, antaŭ la perforto de la aliulo, komprenigas al li: “Atentu, via kapablo voli damaĝi min neniam estos tiom granda kiel la mia ami vin kaj bonfari al vi”. Tiu estas la invito de Jesuo. Poste Jesuo pluiras tuŝi unu el la sokloj de la hebrea spiritualeco, “*Vi aŭdis, ke estas dirite: ‚Amu vian proksimulon…” ,* la amo al la proksimulo estis limigita amo, ĉar ĝi alvenadis ĝis kie ekzistadis la koncepto de proksimulo, kiu estis tre relativa.

La pli strikta koncepto signifis tiu kiu apartenas al mia familia klano, iom pli larĝa al tiu de mia tribo, ankoraŭ iom pli larĝa al la nacio Izraelo, sed ne plie. Do temis pri amo kiu havis limojn. “ *Kaj malamu vian malamikon*”. La malamo al la malamiko estis normala en tiu socio, sed precipe ĝi estis pravigita per la malamo kiun Dio havis por la pekuloj. Tipa estas la kanto de la psalmisto en la psalmo 139, versikloj 21-22 kie estas dirite: “*Kiom mi malamas Sinjoro tiujn kiuj vin malamas. Mi ilin malamas per senkompata malamo, mi ilin konsideras miaj malamikoj”.*

Neniam oni malamas tiom plenĝue kiel kiam oni malamas en la nomo de Dio, ĉar oni sentas sin pravigataj en tiu malamo. Nu Jesuo distanciĝas je ĉio tio. “*Sed Mi diras al vi: Amu viajn malamikojn”*. Jesuo do proponas iun amon je supera nivelo kiu ne nur ne konas la limojn de la amo kiu alvenas ĝis la proksimulo, sed ilin pluiras. Estas tiu la ekskluziva novaĵo de Jesuo, estas iu amo kiu alvenas ĝis enpreni eĉ la malamikon.

Kaj por ‘ami’ Jesuo ne elektis la grekan verbon *fileo*, de kio filozofio, filantropio, iu amo de bonvolo kiu ricevas ion interŝanĝe, sed la verbo *agapao*, de tiu la vorto agapo kiun ni ĉiuj konas, kiu signifas iun amon sendependan de la kvalito de tiu kiu ĝin ricevas, kiu estas sendependa de la respondo de la alia. Do pri iu amo kiu ne rilatas la meritojn de la persono kiu estas amata, iu amo kiu generiĝas pro la bezono de la alia, ne pro la respondo kiun oni povas ricevi.

“*Kaj preĝu por viaj persekutantoj”,* klaras do ke kiel malamiko oni celas tiun kiu persekutas la kristanan komunumon. Nu Jesuo petas paŝon antaŭeniri, tiu ĉi amo ne iĝas reala ĝis kiam ne transformiĝas en amon por tiuj kiuj ĝin persekutas. Se tio estas, okazas tio kio transformas la vivon de la kredanto, *“Tiel vi estos filoj de via Patro”.*

Esti filo en tiu kulturo signifas tiu kiu similas al la patro en la konduto. Nu, se kiu amas la malamikon kaj preĝas por la malamiko similas al la Patro, oni vidas ke tiu estas la kvalito de la amo de Dio, iu amo de Dio kiu atingas ĉiujn, ankaŭ tiujn kiuj estas konsiderataj liaj malamikoj.

Kaj poste Jesuo bildigas kion signifas tiu amo: "*Li igas leviĝi sian sunon super malbonulojn kaj bonulojn"* tio estas vivpropono adresata al ĉiuj. La Dio de Jesuo ne estas bona, li estas ekskluzive bona, li ne rigardas la meritojn de la personoj, sed rigardas iliajn bezonojn. Li ne estas la Dio kiu premias la justulojn kaj punas la perfidulojn, sed al ĉiuj, justuloj kaj perfiduloj, li proponas sian amon.

Kaj poste Jesuo eldiras plian ekzemplon: "*kaj sendas pluvon super justulojn kaj maljustulojn***"**. Tiuj ekzemploj do, kompreneblaj al ĉiuj, la suno kaj la pluvo, signifas ke la amo de Dio estas iu amo de kiu neniu persono rajtas sin senti ekskludita. Jesuo ne diskriminacias inter meritplenaj kaj ne, inter puraj kaj malpuraj, sed lia amo sin adresas al ĉiuj.

Kaj poste Jesuo diras: "*Kaj se vi amas kaj salutas"* kaj li citas la kategoriojn konsideratajn la plej malproksimaj de Dio, la impostistoj, tiuj kiuj estis malpuraj ĝis la esenco mem de la persono, kaj la paganoj, tiuj kiuj havis aliajn diaĵojn, "Se vi amas *kaj salutas nur viajn amikojn, kion rimarkindan vi faras? Vi estus samkiel tiuj kiuj estas profunde malpuraj kaj tiuj kiuj estas sen Dio, la paganoj".*

Kaj jen la fina invito de Jesuo: "*Estu do perfektaj…"* kio signifas esti plenaj, kompletaj, *"kiel via ĉiela Patro estas perfekta."* Jen, post ĉio tio, ni do bone komprenas kion signifas tiu invito al perfekteco. Ĝi signifas esti ĝisfunde bonaj. Kaj tio ne estas virto, eksterordinara heroaĵo ebla nur al kelkaj, sed esti ĝisfunde bonaj estas en la kapabloj kaj ebloj de ĉiu persono.

Kiam tio reali gas, la vivo de la kredanto plektiĝas kun tiu de Dio kaj iĝas ununura afero; la homo permesas al Dio esti lia Patro kaj elprovas lian intiman profundan ĉeeston en ĉiu okazaĵo de propra ekzisto kaj de propra vivo.